



Verda Lumo

de la «Verda lampo»,
diĝesto

<https://verdalampo.info>

No 6




Pri [La japana knabina tago \(la 3^a de marto\)](#) rakontis **Hori Jasuo** (verkisto kaj eldonisto, la Esperantisto de la Jaro 2018, kreinto de [Esperanto-sumoo](#)

Li ĉiu-jare faras [paperajn pupojn](#) por ke infanoj havu belan estontecon.

Mi daŭrigas skribi la Historion de esperanto-movado en nia lando (Rusia Imperio, Soveta Unio, Ukrainio) – la skizaj notetoj por mi mem. Tamen mi decidis [lokigi ilin en la retpaĝaro](#), verŝajne, tiu interesigos iun ajn.

Mi affikas, ke multegaj materialoj malaperis. Kvankam okazas interesaj trovaĵoj. Ekzemple, kelkaj paperoj kaj kelkaj ciferecigitaj numeroj de ĵurnalo «Amikeco»...



Kiel transnavigi maron «**Inter diro kaj faro estas maro**»

Preskaŭ dum unu kaj duonjarcento

esperantistoj, «sidante al la marbordo», atendas la finan venkon de la lingvo. Pasas sezonoj, jaroj, generacioj... Sed ili tutan tempon atendas, atendas, anendas, ke la fina venko alvenos memstare. Tamen ekzistas aliaj, aktivaj homoj.

[Ni parolu pri EsperOri](#)



Mi fanfaronas :))

Antaŭ nelonge aperis laŭvica broŝuro el serio "Esperanto por mi", kie inter la portretoj de aktivaj esperantistoj estis presita ankaŭ mia kurta rakonto pri mi. Estis agrable kaj samtempe timeme trafi en kompanion de tiuj spertaj kaj meritaj esperantistoj.

Nun mi devas pli fervore labori por konveni al ili. Iniciato krei la serion "Esperanto por mi" apartenas al la japana esperantisto HORY Jasuo, kaj la portretojn desegnis germana pentristino Helga Plötner (legu la revuon "Esperanto", No 1381 (7-8), 2023). [Sageto](#)



Mi multe aŭdis pri la libro "Historio de la Esperanta Literaturo" kaj longe revis aĉeti ĝin. Mi imagis: mi sidigas sur la granda profunda apogseĝo kaj foliumis paĝojn...

Tiel do estis.

Mi foliumis bonkvalitan paperajn paĝojn, serĉis konatajn nomojn, fojfoje atentis pri nekonataj. Tio estis ne simpla ĝuo, sed delico!

La libron estas destinata por uzado tra multaj jaroj.

[Mia Esperanto-biblioteka](#)